



**Esperanto  
Societo  
Frankfurto**

**decembro 2013**

Esperanto-Gesellschaft Frankfurt am Main e.V.  
gegründet 1904 – fondita 1904

## ESPERANTO INFORMILO

Esperanto-  
Gesellschaft  
Frankfurt am Main

[www.esperanto-frankfurt.de](http://www.esperanto-frankfurt.de)

1. Vorsitzende:  
Katarina Eckstädt  
Geschwister-Scholl-  
Str. 1  
63486 Bruchköbel  
Tel. 06181 76343,  
e-mail:  
[ke.esperanto@t-online.de](mailto:ke.esperanto@t-online.de)

**Bankverbindung:**  
Esperanto-  
Gesellschaft  
Frankfurt /Main  
K-to-Nr.771571701  
BLZ 500 800 00  
Commerzbank  
Frankfurt/Main

**Beitrag:**  
mit DEB-Beitrag 80 €  
Familienmitglied 40 €  
Nur ESF: 20 €  
Familienmitglied 10 €



foto: ke

**Karaj membroj,  
al vi kaj viaj familioj,  
al ĉiuj niaj amikoj en  
Francio, Italio,  
Brazilio, Britio,  
Hispanio, Litovio,  
Serbio, Slovakio,  
Rusio kaj Usono,  
ni deziras  
belegan adventon,  
ĝojan kristnaskon  
kaj sukcesoplenan  
novan 2014 jaron.**

La Estraro de ESF

**einladung zum klubabend**

**invito al la klubvespero**

Saalbau Bockenheim  
Schwälmer Str 28  
Frankfurt am Main

**donnerstag, d. 5.12.2013**

**ĵaŭdon, la 5an de dec. 2013**

Liebe Mitglieder,  
Freunde und Interessenten,  
wir laden Sie zum nächsten Klubabend ein,  
der am Donnerstag, den **5. 12. 2013** statt-  
finden wird.

Karaj membroj, geamikoj kaj  
interesiĝantoj,  
ni invitas vin al la venonta klubvespero, kiu  
okazos ĵaŭdon, la **5an de decembro 2013**.

19 h

## Kristnaska festo



Karaj membroj,  
ankaŭ ĉijare ni festos kune la Kristnaskon kun adventaj bakaĵoj, nuksoj.  
dolĉaĵoj, kristnaskaj trinkaĵoj interesaj tekstoj kaj muziko.

Kiel en la lasta jaro, ankaŭ ĉijare ni prezentos duoblajn librojn, por ke ĉiu  
povu preni senpage kelkajn por si. Ni ja heredis kaj bezonas spacon en  
la ŝrankoj! Do, riĉigu vian bibliotekon!

Ni petas ĉiujn helpantojn, por dekori la ejon, veni je 18,30h.

Liebe Mitglieder,  
auch in diesem Jahr feiern wir das Weihnachtsfest mit Plätzchen, Nüssen,  
Süßigkeiten, Weihnachtsgetränken, interessanten Texten und Musik.

Wie in letzten Jahr, werden wir auch in diesen Jahr doppelte Bücher aus-  
stellen, damit sich jede(r) einigekostenlos mitnehmen kann. Wir haben ja  
geerbt und brauchen Platz in den Schränken! Bereichern Sie also Ihre  
Bibliothek!

Wir bitten alle Helfer, um 18,30 h zu kommen

**donnerstag, den 19.12.2013**

**ĵaŭdon, la 19an de dec. 2013**

**das treffen**

**la renkontiĝo**

**findet nicht statt**

**ne okazos**

## geburtstage im dezember

Bibiana Gajewski, 01.12.  
Ekkehard Beyer, 07.12.  
Norbert Pulver, 13.12.

## naskiĝtagoj en decembro

Eveline Hoffmann, 20.12.  
James Josef McMahon, 31.12.

**Ni gratulas!**

## weihnachtsgans

In einem Vorort von Wien lebten in der hung-  
rigen Zeit nach dem Krieg zwei nette alte Da-  
men. Damals war es noch schwer, sich für  
Weihnachten einen wirklichen Festbraten zu  
verschaffen. Und nun hatte die eine der Da-  
men die Möglichkeit, auf dem Land - gegen  
allerlei Textilien - eine wohl noch magere,  
aber springlebendige Gans einzuhandeln. In  
einem Korb verpackt, brachte Fräulein Aga-  
the das Tier nach Hause. Und sofort began-  
nen Agathe und ihre Schwester Emma das  
Tier zu füttern und zu pflegen.

Und so kam der Morgen des 23. Dezember  
heran. Es war ein strahlender Wintertag. Die  
ahnungslose Gans stolzierte vergnügt von  
der Küche aus ihrem Körbchen in das Schlaf-  
zimmer der beiden Schwestern und begrüß-  
te sie zärtlich schnatternd. Die beiden Damen  
vermieden es, sich anzusehen. Nicht, weil  
sie böse aufeinander waren, sondern nur,  
weil eben keine von ihnen die Gans schlach-  
ten wollte.

"Du musst es tun", sagte Agathe, sprach's,  
stieg aus dem Bett, zog sich rasend rasch  
an, nahm die Einkaufstasche, überhörte den  
stürmischen Protest und verließ in gerade-  
zu hässlicher Eile die Wohnung.

Als Agathe nach geraumer Zeit wiederkehr-  
te, lag die Gans auf dem Küchentisch, ihr lan-

## kristnaska ansero

En antaŭurbo de Vieno vivis dum malsata  
tempo post la milito du ĉarmaj maljunaj da-  
moj. Tiam estis ankoraŭ malfacile atingi por  
la kristnaskon veran festotagan rostaĵon.

Unu el la damoj havis eblecon en la kampa-  
ro interŝanĝi – kontraŭ diversaj tekstilaĵoj –  
unu ankoraŭ malgrasan, sed tre viglan an-  
seron. Pakitan en korbo kunportis fraŭlino  
Agathe la beston hejmen. Tuj komencis  
Agathe kaj ŝia fratino Emma manĝigi kaj  
flegi la beston.

Kaj tiel venis la mateno de la 23a de decem-  
bro. Estis brila vintra tago. La ansero fiere  
kaj gaje paradis el la kuirejo en la dormo-  
ĉambron de la fratinoj kaj salutis ilin milde  
gakante. Ambaŭ damoj evitis rigardi sin re-  
ciproke. Ne ĉar ili estis koleraĵoj unu kontraŭ  
alia, sed ĉar neniu el ili volis buĉi la anseron.  
„Vi devas tion fari“, diris Agathe, parolis, elliti-  
ĝis, sin vestiĝis rapidege, prenis la butiku-  
man sakon, intence ne volis aŭdi furiozan  
protes-ton kaj forlasis vere malbele hastante  
la loĝejon.

Kiam Agathe post iom da tempo revenis, ku-  
ŝis la ansero sur kuireja tablo. Ĝia longa ko-  
lo pendis triste malsupren. La sango ne estis  
videbla, sed baldaŭ du karaj, maljunaj damoj,  
kiuj ploregante brakumis sin. „Kiel...kiel...!,  
plorsinglutis Agathe, „kiel vi faris tion?“ „Per...

ger Hals hing wehmütig pendelnd herunter. Blut war keines zu sehen, aber dafür alsbald zwei liebe alte Damen, die sich heulend umschlungen hielten. "Wie... wie...", schluchzte Agathe, "hast du es gemacht?" "Mit... mit... Veronal", wimmerte Emma. "Ich habe ihr einige meiner Schlaftabletten auf einmal gegeben, jetzt ist sie..." schluchzend, "huh... rupfe musst du sie... huh huh huh", so ging das Weinen und Schluchzen fort. Endlich raffte sich Agathe auf und begann, den noch warmen Vogel zu rupfen. Federchen um Federchen schwebte in einen Papiersack, den die unentwegt weinende Emma hielt. Und dann beschloss man, nachdem es mittlerweile spät am Abend geworden war, das Ausnehmen der Gans auf den nächsten Tag zu verschieben. Am zeitigen Morgen wurden Agathe und Emma geweckt. Mit einem Ruck setzten sich die beiden alten Damen gleichzeitig im Bett auf und stierten mit aufgerissenen Augen und Mündern auf die offene Küchentür. Hereinspazierte, zärtlich und schnatternd wie früher, wenn auch zitternd und frierend, die gerupfte Gans.

Bitte, es ist wirklich wahr und kommt noch besser. Als ich am Weihnachtsabend zu den beiden Damen kam, um ihnen noch rasch zwei kleine Päckchen zu bringen, kam mir ein vergnügt schnatterndes Tier entgegen, das ich nur wegen des Kopfes als Gans ansprechen konnte, denn das ganze Vieh steckte in einem liebevoll gestrickten Pullover, den die beiden Damen hastig für Ihren Liebling

per... Veronal!" plorĝemetis Emma. „Mi donis al ŝi kelkajn de miaj dormigaj tablojdoj per unu fojo, nun ĝi estas...“ plorĝemante, „hu... vi devas ĝin senplumigi... hu hu hu“, tiel daŭrigis plura plorado kaj plorĝemado. Finfine Agathe rekolektis ĉiujn siajn fortojn kaj komencis senplumigi ankoraŭ varman birdon. Plumeto post plumeto ŝvebis en papersakon, kiun haltis senĉese ploranta Emma. Ili decidis, ĉar intertempe iĝis malfrua vespero, forŝovi la senviscero de la ansero al la sekvanta tago.



Sekvantan fruan matenon estis Agathe kaj Emma vekiĝitaj. Kun unu ekpuŝo eksidiĝis samtempe ambaŭ maljunaj damoj en la lito kun malfermitaj buŝoj rigide rigardante sur kuirejan pordon. La senplumigita ansero enpromenis kiel antaŭe milde gakante. Mi petas, ĉio estas reala vero kaj okazas ankoraŭ pli bone. Kiam mi Kristnaskan vesperon venis al la du damoj, por porti al ili du malgrandajn pakafetojn, venis gaje gakanta besto kontraŭ mi, kiun mi nur pro la kapo povis rekoni kiel ansero, ĉar la tuta besto estis enigiita en amoplene trikitan pulovron,

gefertigt hatten. Die Pullovergans lebte noch weitere sieben Jahre und starb dann eines natürlichen Todes.

kiun haste faris du damoj por sia karulo. La pulovroansero vivis ankoraŭ plurajn sep jarojn kaj mortis nature. (el interreto tradukis ke)

## James Sayers kaj nia societo

James Sayers? Wer ist das? James Sayers war ein amerikanischer Esperantist, der verbunden ist mit der Reaktivierung unserer Gesellschaft nach dem Zweiten Weltkrieg. Alle unsere Mitglieder und Gäste unterschreiben, wenn sie an einem unserer Treffen teilnehmen, in unserem Unterschriftenheft. Unser Klub besitzt mehrere Unterschriftenhefte aus mehr als 100 Jahren unseres Bestehens. Sicher ist, dass wir ein Heft nicht mehr haben. Im ersten Heft sind die Unterschriften von 1904 bis zum 27. Januar 1930. Dann unterschrieb man in das folgende Heft, das wir leider nicht mehr haben. Es ist wahrscheinlich konfisziert worden, als die Nazis Esperanto verboten.

Wir haben über das erste Heft schon geschrieben. Heute interessiert uns nur das Ende des Heftes. Nach dem Zweiten Weltkrieg hat Herr Barthel an die Mitglieder geschrieben und sie zu einem Treffen eingeladen. Weil das Unterschriftenheft weg war, unterschrieben die Teilnehmer auf die verbliebenen restlichen 3 Seiten des ersten Unterschriftenheftes. Dort können wir lesen, dass das eine Vorbereitungssitzung ist, die am 7. Oktober 1945 mit fünf Teilnehmern stattfand. Das waren Martin Senkfüll (?), Leo-Leonard und Ludwig Puff, Josef Donner und

James Sayers? Kiu estas tio? James Sayers estis usona esperantisto ligita kun revivo de nia societo post la dua milito.

Ĉiuj niaj membroj kaj gastoj, se ili partoprenas iun el niaj renkontiĝoj, subskribas en nian kajeron de la partoprenantoj. Nia klubo posedas plurajn kajerojn kun subskriboj el pli ol 100 jaroj de nia ekzistado. Estas certe ke unu el la kajeroj ni ne plu posedas. La unua kajero estas ekde 1904 ĝis la 27an de januaro 1930. Tiam oni subskribis en la sekvantan kajeron kiun ni, bedaŭrinde, ne posedas. Ĝi estas verŝajne konfiskita de naziistoj kiam ili malpermesis Esperanton.

Ni jam skribis pri la unua kajero. El ĝi ni ekscias multon pri niaj membroj kaj niaj gastoj. Hodiaŭ estas por ni interesa nur la fino de la kajero.

Post la dua mondmilito s-ro Barthel skribis al la membroj kaj invitis ilin al renkontiĝo. Ĉar la kajero estis for, la partoprenantoj subskribis sur malplene restantajn 3 paĝojn de la unua kajero. Tie ni povas legi, ke ĝi estas preparkunsido okazinta la 7an de oktobro 1945 kun kvin partoprenantoj. Tiuj estis Martin Senkfüll (?), Leonard kaj Ludwig Puff, Josef Donner kaj Carl Barthel.

La 27an de novembro 1945 okazis kunveno al honoro de s-ro James Sayers. Li subskri-

Carl Barthel.

Am 27. November 1945 fand ein Treffen zu Ehren von Herr James Sayers statt. Er unterschrieb mit seiner amerikanischen Adresse. Bei diesem Treffen sind außer Herrn Sayers noch 7 deutsche Esperantisten dabei. Das folgende Treffen fand am 24 Februar 1946 statt. An diesem Treffen nahmen Herr Sayers und jetzt 9 deutsche Esperantisten teil. Die Unterschrift von Herrn Sayers hat einen Zusatz. Neben seinem Namen ist ein Zettelchen mit maschinengeschriebenem Namen und seiner Adresse in Frankfurt eingeklebt: Am Leonhardsbrunnen 18.

Auf der folgenden Seite kleben zwei Zettel: die Einladung von Herrn Barthel an Mitglieder und ein kleiner Brief mit folgendem Inhalt: „*Sehr geehrter Herr Barthel, ich bedaure, dass ich Sie nicht gesehen habe, doch ich will Ich-nen und den anderen Frankfurter Anhängern großen Erfolg für die Reaktivierung der Gruppe und der Arbeit wünschen. Ich werde Herrn Goldsmith über Sie berichten. Herzliche Grüße Carl H...*“

Wer war Herr Sayers? Er wurde 1888 geboren und war US-Esperantist und Esperanto Schriftsteller. Er schrieb auch in Englisch. 1925 ist seine Broschüre *A Brief Account of the International Language Movement (Kurze Geschichte von der Bewegung der Internationalen Sprachen zu etablieren)* von IALA (eine US-Gesellschaft, die das Ziel hatte „eine klar lehrbare Hilfssprache mit einfacher Grammatik in allen Länder neben den Nationalen Sprachen zu etablieren. In den USA

bis kun sia adreso en Usono. Dum tiu renkontiĝo ĉeestis krom s-ro Sayers ankoraŭ 7 germanaj esperantistoj.

La sekvanta renkontiĝo okazis la 24an de februaro 1946. Ankaŭ tiun ĉi partoprenis s-ro Sayers kaj ĉi foje 9 germanaj esperantistoj. La subskribo de s-ro Sayers havas aldonaĵon. Apud lia nomo estas gluita paperpeceto sur kiu estas tajpita lia nomo kaj lia adreso en Frankfurt: Am Leonhardsbrunnen 18.

Sur sekvanta paĝo estas gluitaj du paperoj: la invito de s-ro Barthel al niaj membroj kaj malgranda letero kun sekvanta enhavo: „*Estimata s-ro Barthel. Mi bedaŭras ke mi ne vidis vin ree, tamen mi volas al vi kaj aliaj Frankfurtaĵ samideanoj la plej grandan sukceson por la restarigo de la grupo kaj la agado. Mi raportos al s-ro Goldsmith pri vi. Korajn salutojn Carl H...*“

Kiu estis s-ro Sayers? Li naskiĝis en la jaro 1888 kaj estis usona esperantisto kaj Esperanto-verkisto. Li skribis ankaŭ en la angla. En 1925 aperis lia broŝuro *A Brief Account of the International Language Movement* (Mallonga rakonto pri la movado de internaciaj lingvoj) ĉe IALA. (IALA estis usona asocio kiu celis „starigi helplingvon, simpla kaj klara instruota en ĉiuj landoj apud la naciaj lingvoj“. En Usono li skribis ankaŭ romanojn pri la "sovaĝa okcidento". Post la dua mondmilito li estis oficiro pri informado ĉe la usona armeo en Frankfurto /M.

Ni posedas en nia biblioteko lian libron „Invito al ĉielo“. Ĝi estas eldonita en la jaro 1949 ĉe eldonejo Ziegler en Munkeno. En la jaro 1951 ĝi aperis ankaŭ tradukita en la finna lin-

hat er auch Romane über den „Wilden Westen“ geschrieben. Nach dem Zweiten Weltkrieg war er Offizier für Informationen bei der US-Armee in Frankfurt. Er hat geholfen, unsere Klubarbeit wieder aufleben zu lassen. Wir haben in unserer Bibliothek sein Buch „Einladung zum Himmel“. Es ist 1949 bei dem Verlag Ziegler in München erschienen. 1951 ist eine Übersetzung in Finnisch erschienen. Das ist eine Science-Fiction-Geschichte über einen Flug zum Mars. Wir zitieren Teile der Kritik von Stellan Engholm aus „Malgranda Revuo“ (Nr. 1/1950). *„Der Schutzumschlag zeigt ein Weltraumfahrzeug unterwegs zum Mars. Dieses Bild weist auf den Hauptrahmen der Geschehnisse hin, aber nicht auf das Wesentliche (das wäre auch sehr schwer mit einem Bild darzustellen). Das Wesentliche befindet sich auf geistigen Plan der menschlichen Evolution. Vielleicht kann man sagen, das es eine Geschichte in der Art von Jules Verne ist, jedoch auf höherem intellektuellen Niveau. Vor dem Lesen dieses Buches habe ich nicht geglaubt, dass ein fantastischer technischer Roman gut sein kann, um ein ernsthaftes und tiefes Lebenskonzept darzustellen. Während ich das Buch las, stellte ich fest, dass dies dem Autor meiner Meinung nach völlig gelungen ist. Dass ihm das gelungen ist, muss an seiner eigenen Persönlichkeit und seinem eigenen hohen Lebenskonzept liegen. Sein Ziel ist nicht die Darstellung der fantastischen Geschehnisse, sondern dessen, was insgesamt und absolut das wichtigste in unserem Leben ist. Das Buch spielt einige Jahre in der Zukunft und die der Zukunft und die jetzigen Probleme und Ge- jetzigen Probleme und Gefahren sind aktuell. Der*

gvo. Ĝi estas fikcia rakonto pri flugo al Marso. Ni aldonas la parton de la recenzo de Stellan Engholm el „Malgranda Revuo“ (n-ro 1/1950). *„La protektkovrilo prezentas mondspacan raketveturilon survoje al Marso. Tiu bildo indikas la ĉefan kadron de la okazado sed ne ĝian esencon (kaj estus tre malfacile prezenti ĝin per unu bildo). La esenco troviĝas sur la spirita, homevolua plano. Oni eble povas diri, ke estas la rakontarto de Jules Verne, levita al la spirita plano. Antaŭ la legado de tiu ĉi libro mi apenaŭ estus kredinta, ke fantazia teknika romano povus sukcese servi kiel esprimilo por serioza kaj profunda vivkoncepto. Leginte la li bron mi konstatas, ke la aŭtoro sukcesis en tio, laŭ mia impresio plene. Ke li sukcesis devas dependi de lia propra personeco, de lia propra alta vivkoncepto. Lia celo estis prezento ne de fantazia okazado sed de tio, kio entute, absolute, estas la plej grava en nia vivo. La tempo estas kelkajn jarojn estonte de la nia, kaj la nunaj problemoj kaj danĝeroj fariĝis akutaj. La enhavo efektive estas arde aktuala, por ĉiu homo en la mondo. La aŭtoro mencias, ke la unua instigo al tiu rakonto estis libro, kiu interpretis bibliajn profetaĵojn laŭ rilato al nia tempo. Mi ne scias, ĉu la aŭtoro konsideras tiujn klarigojn pli malpli aŭtoro konsideras tiujn klarigojn pli malpli laŭlitere veraj. Se jes aŭ se ne, li ĉiuokaze pentris grandiozan bildon de la plej esenca afero en la homa ekzistado. Al mi persone ŝajnas, ke maŝinoj ludas tro gravan rolon en*



*Inhalt ist brandaktuell für jeden Mensch in der Welt. Der Autor erwähnt, dass der erste Ansporn für diese Geschichte ein Buch ist, das biblische Prophezeiungen mit unserer Zeit in Verbindung bringt. Ich weiß nicht, ob der Autor diese Erklärungen mehr oder weniger als Wahrheit betrachtet. Egal. Er hat auf jeden Fall ein grandioses Bild des Wesentlichsten der menschlichen Existenz gezeichnet. Mir persönlich scheint, dass Maschinen eine viel zu große Rolle spielen in dem Leben von geistig so hochstehenden Wesen wie den Marsbewohnern. Wenn man jedoch diesen Punkt der Erzählung nicht für richtig hält, macht das die Geschichte nicht kaputt. ... „Als ich dieses Buch las, hatte ich immer das Gefühl, dass ich etwas Ernsthaftes und sehr Wichtiges lese, was wir ernsthaft betrachten müssen. Diese Wirkung, wie gesagt, muss von der Persönlichkeit des Autors abhängen, aber um sie zu erreichen, ist der Stil sehr wichtig. Wenn ich mich nicht sehr irre, hat er in seiner Esperanto-Form viele wertvolle Qualitäten des guten englischen Stil und ich glaube, man kann ihn auch dann gut nennen, wenn man die Bibel oder Gullivers Reisen als Maßstab benutzt.“*

Herr Sayers war später in der US-Esperanto-Bewegung aktiv. Er war einer der Gründer der ELNA (Esperanto-Liga für Nordamerika) und auch ihr stellvertretender Vorsitzender von 1954 bis 1956. Er starb am 26.12.1957 in Lillie, Louisiana.

ke

*la vivo de spirite tiel altnivelaj homoj kiel la marsanoj. Tio tamen estas punkto kiu, se ni eventuale ne aprobas ĝin, neniel detruas la esencon de la libro.“... „Legante tiun libron mi ĉiam havis la senton, ke mi legas ion seriozan kaj tre gravan, kion mi devas serioze konsideri. Tiu efiko, kiel dirite, devas dependi de la personeco de la aŭtoro, sed la rimedo por atingi ĝin estas la stilo. Se mi ne tremisjuĝas, ĝi havas en sia esperanta formo multajn valorajn kvalitojn de bona angla stilo, kaj mi kredas, ke oni povas nomi ĝin bona, eĉ se oni uzas Biblion aŭ „Vojaĝojn de Gulliver“ kiel mezurilon.“*

S-ro Sayers estis poste aktiva en la usona Esperanto-movado. Li estis kunfondinto de ELNA (Esperanto-Ligo por Norda Ameriko) kaj ĝia vicprezidanto inter 1954 kaj 1956. Li mortis la 26an de decembro 1957 en Lillie, Louisiana.

ke



**Feliĉan jaron**



**2014**